

La du oomotanaj gejunuloj vizitos Knittelfeld post UK

Kiel ni anoncis en nia marto-aprila numero, la Oomotana Junulara Organizo (OJO) decidis delegi ĉiujare du reprezentantojn al la Universala Kongreso de Esperanto. La du elektitoj por la ĉi-jara, s-ro Kinsuke Ito kaj f-ino Jumijo Iŭamoto forveturis de Kameoka la 14an de julio por partopreni en la 22-a Internacia Junulara Kongreso kaj poste en la 51-a U.K.

Pli frue, la 11-an de julio, s-ro Yosio Otsuki, urbestro de Kameoka, komisiis al la gejunuloj la transdonon de lia mesaĝo al s-ro Albert Seitlinger, urbestro de Knittelfeld, la aŭstra urbo, kun kiu Kameoka “ĝemeliĝis” en 1964. Do la du oomotanoj, reprezentante la urbestron kaj urbon de Kameoka, vizitos la aŭstran “fratinan urbon” (laŭ la japana esprimo) dum tri tagoj tuj post la U.K., de la 8-a ĝis 10-a de aŭgusto.

La foto, kiu aperis en la ĵurnalo Kioto-Ŝinbun, montras la gejunulojn, al kiuj la urbestro de Kameoka konfidis sian mesaĝon.

Al Sinjoro Urbestro kaj ĉiuj Urbanoj de Knittelfeld ni ankaŭ sendas niajn sinceran saluton kaj bondezirojn !



Heterogena Kulturo de Japanujo

La Araba Nomado, artikolserie aperinta en *Asahi Sinbun* (ĵurnalo) tre interesis nin, kiuj okupiĝas en la kompara studo pri la kulturoj.

La aŭtoro raportisto Kacuiĉi Honda, kiu vivis inter beduenoj sur la Araba duoninsulo, rakontas en tiu artikolo ankaŭ la spertojn, kiujn li iam havis inter eskimoj de la Norda Poluso aŭ altaĵaj indiĝenoj de Nov-Gvineo, — la spertojn, kiuj estas alispecaj, ol tiuj, kiujn li havis inter la Araba nomado.

Inter la t.n. “necivilizitaj” eskimoj kaj nov-gvineanoj li ricevis la fortan impreson, ke la homoj, ĉu civilizitaj aŭ ne, estas finfine egalaj. Sed inter la araboj, kiuj havas malnovan historion kaj montras relative altan gradon de civilizo en la moro de longtempa reciproka cedado je sidloko aŭ en la speciala formo de bonvenigado de gastoj, li ricevis la kontraŭan impreson kaj diras al si: “Kiel malsamaj homoj ili estas!”

Ekzemple okazis, ke la akceptisto de hotelo en la urbo Riyadh erare donis al Honda ŝlosilon, kiu ne estis por lia ĉambro. Reveninte al la akceptejo kaj montrante la ŝlosilon al la akceptisto, li diris, “Mi ne povis eniri en mian ĉambron”, kun ĝentila

rideto por ne ofendi la personon. Tiam resaltis al li tute neatendita respondo: “Vi diris eraran numeron!”

Momenton Honda gapis pro surpriziĝo. Sed el sia propra vivsperto sur la dezerto li jam sciis la senhontan aŭdacon de la nomado kun la “rabo-kulturo”, kaj li diris al si en la koro: “Jen la maniero tipe beduena!”

Tio eble estas ekzemplo de — por citi la esprimon de la mortinta D-ro Ŭacuĵi, — la “sekeco de la penso” de la “dezerta homo”. Sed kio estas pli grava, estas la jena observo de Honda:

“Imagu japanon, kiu akcidente rompis teleron de iu alia: li certe diros tuj: ‘Pardonu!’ Kaj se li estas sufiĉe ĝentila, li aldonos: ‘Mi ja respondecas por tio!’ Tio estas nenio alia ol bonmoro ĉe ni. Sed ĝi ne estas bonmoro komuna tra la mondo. En la rekta antipodo de tiu bonmoro estas la araboj kaj proksime al ili estos ankaŭ la hindoj. . .

“Mia propra vivsperto ne estas sufiĉe vasta. Mi do konsultis multajn el miaj amikoj kaj konatuloj kaj ankaŭ librojn por kolekti la ekzemplojn de la homa ‘reago al sia propra miskonduto akcidenta’. La rezultato el tiu kolekto estis por mi io surpriza.

Mi trovis ke la kutimo 'pardonpeti pro akcidenta rompo de telero' troviĝas en nur malmultaj el la ĉefaj landoj de la mondo. Apenaŭ troviĝus tia simplanimulo, kiu aldonus: 'Mi respondecas por tio!'

"Se ni konsideras Japanujon kaj Arabujon du antipodoj, venas inter ili la diversaj eŭropaj landoj, sed pli proksime al la Araba antipodo ol en la mezo. Eĉ en najbara Ĉinujo oni apenaŭ trovas tian simplulon".

Laŭ mia sperto kaj scio, kvankam ne riĉaj, mi povas diri, ke kion Honda skribas, tio estas ĝusta. Jen kelkaj ekzemploj, kiujn mi havas.

Unu japano, kiu veturigis aŭtomobilon sur strato en Usono, koliziis kun alies aŭtomobilo en tia stato, pri kiu oni ne povis decidi, kiu el ili estis kulpa. Sed tuj post la momento de la akcidento li ellasis la naturan esprimon, "I am sorry!" (Pardonu!), kaj nur pro tio li perdis la proceson, kiu poste okazis, ĉar oni juĝis la esprimon atesto de lia rekono pri la kulpo.

Alia japano, kiu veturigis aŭtomobilon sur strato en unu eŭropa lando, ricevis de postan kolizion de la aŭtomobilo, kiun veturigis virino. Tiu virino kriis rekte en lian vizaĝon: "Mi ne estis kulpa!" Mi aŭdis rekte de tiu japano, ke li estis multe ofendita de tia eldiro.

Kredeble ankaŭ en Japanujo la viv-

sento de la gejunuloj, kiuj veturigas sian aŭtomobilon, multe ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj. Kaj tamen, kiu el ili povus eldiri, "Mi ne estis kulpa!" kiel unuan aferon tuj post la momento de la akcidento okazinta evidente pro lia kulpo!

Oni povas diri ke la kulturo de Eŭropo estas multe pli rafinita ol tiu de la beduenoj. Tusinte por klarigi sian gorgon dum konversacio oni tuj diros, "Pardonu!" kaj oni havas ankoraŭ sufiĉe da bonmoro, ke la amikecon, unu fojon starigitan, oni vartas longe, ktp. Sed en la urba vivo de la civilizitaj eŭropaj landoj estas ankaŭ tia rigora severeco, kiu jam ne permesas al la homoj tuj rekoni sian kulpon pro la antaŭzorgo eviti la konsekvencojn, kiuj alie nur malfaciligus ilian situacion.

Koncerne la vivon de la reprezentantoj — komercistoj aŭ negocistoj — de la japanaj firmaoj — kiuj loĝas en eŭropaj landoj, oni raportis lastatempe la multajn okazojn, en kiuj ili ne povas rivali kun la ŝtala nervo kaj persista sinteno de la eŭropaj negocistoj: ili fariĝas aŭ tro nervozaj aŭ tro malaplombaj, aŭ ridinde afektas gravulan mienon, ktp.

Finfine Honda rimarkis, ke la sinteno de la araboj kaj de la eŭropanoj estas pli ĝenerala ol la speciala sinteno de la japanoj. Al li, Sasuke Nakao, kiu estas profesoro de Osaka

Malto, La Historia Insulo (1)

Enkonduko — El la maltaj insuloj : Malto, Gozo, Kemmuna kaj Filfla, nur la unuaj du estas enloĝataj. Malto dividiĝas en 45 urboj kaj vilaĝoj; Gozo en 12. Tiuj insuloj, antaŭe kunligitaj kun Sicilio, estas la iamaj suraĵoj de monto subakviĝinta ĉ. kvar mil futojn sub la mar-nivelo. La tuta areo estas 122 mejlojn kvadratajn. Malto, la plej granda el ili, estas ĉ. 17 mejlojn longa kaj 9 mejlojn en la plej larĝa parto. Ĝia areo estas el 95 mejloj kvadrataj. La Malta insularo situas 58 mejlojn malproksime de Sicilio kaj 180 m de Nordafriko.

Onidire la nomo Malta devenas el la Fenika (Punika) vorto Malet, kiu signifas : rifuĝejo. Ĉar la semidaj

lingvoj (kaj la Punika estas ties parenco) ne havas vokalojn, la vorto Malet estus skribata MLT, kaj certe oni povas prononci ĝin Malet, Melita aŭ eĉ Malta (la vokaloj ne gravas al la kompreno). Fakte la dua vorto estis uzata de la Romanoj.

La Maltaj insuloj tenas la duan lokon en la vicoj de la monda popoldenseco. Nuntempe en ĝi troviĝas proksimume 330,000 enloĝantoj, t.e. 2,700 je ĉiu mejlo kvadrata.

Prahistorio — La prahistorio de Malto perdiĝas en la mallumo de la tempo, miljarojn antaŭ Kristo. La insulo, antaŭ la apero de la homo tie (ĉ. 3,000 a.K.) estis tute arbara, sur kiu vivis nur elefantoj, hipopotamoj, sovaĝaj ursoj, cervoj, k.a., kies

Urba Universitato kaj kiu havas abundan sperton de esplor-ekspedicio, diris :

“Japanujo eble estas la plej lasta mister-regiono de la mondo”.

El kio devenas la speciala karaktero de la japanoj aŭ la heterogeneco de la japanoj rilate al la aliaj? — Esplori tion kaj klarigi ĝin science — jen estas mia deziro.

Trad. : Takeo Sakuma

Redakcia noto : La aŭtoro estas specialisto pri kultura antropologio, kaj profesoro pri Japana Kulturo ĉe Tohoku-Universitato. La tradukinto estas 23-jara studento de Gunma-Universitato. La peco, kiun li esperantigis ĉi-supre estas la unua el la artikolserio “La Tipo de Japana Kulturo” aperinta en Asahi Ŝinbun (dat. 12. 12. 1965). Por la traduko iom kunlaboris la red.

restaĵojn, kune kun la iloj de la Malta prahomo, oni eltrovis en suda kaverno nomata Ghar Dalam (pr. Ar Dalam, kiu signifas ‘La Kaverno Malluma’), kaj konservas en apuda Muzeo. Ege admirindaj tie estas la rekonstruoj de la “elefantoj pigmeaj” propraj al Malto. Kaj el la ok homdentoj trovitaj tie en 1917, du estas, laŭ Sir Arthur Keith, karakterizaj de la Neandertalulo.

Inter 3,000 kaj 1,400 a.K. enloĝis Malton Neolitika raso, kiu postlasis la famekonatajn, dise trovitajn sur la insulo, Megalitajn (greka nomo kiu signifas ‘granda ŝtono’) templojn, arĥeologie tre interesajn pro siaj ŝtonegoj kaj formoj. Laŭ pli ol unu arĥeologiisto, nenia similaĵo estas ie trovebla en la Mediteraneo. Kaj tio montras la altrangan civilizacion, kiun ĝuis ĉi tiuj praloĝantoj.

La plej famekonataj pratemploj estas tiuj de Skorba, Haĝar Qim (pr. Haĝar Kim: ‘Rekta Ŝtonaro’), Mnajdra, Ĝgantija (pr. Ĝgantija) en Gozo, krom aliaj. Ties multajn statuojn kaj moveblajn restaĵojn konservas la Nacia Muzeo en Valletta. La plej granda el tiuj pratemploj estas de la trioblŝtonepoka en Tarxien (pr. Tarŝin), elfosita en 1914.

La pratemploj havas ĝenerale la saman planon: antaŭkorto duonronda; poste, elipsaj ĉambroj dividitaj per kuniga trairejo en du flankaj ab-

sidoj; ĉe la plejinternejo troviĝas la Sanktujo kun altaro por bestoferoj. Kaj la tuton ĉirkaŭas grandegaj ŝtonoj.

La Bronzepokulo, bone konante la uzadon de la kupro kaj bronzo, aperis en Malto en ĉ. 1400 a.K. Ĉi tiu raso okupis la jam menciitajn Neolitikajn (greka nomo kiu signifas ‘Nova Ŝtonepoko’) templojn, speciale tiujn de Tarŝin kaj Hal Saflieni. La unua, kiu entenas multajn ŝtonskulptaĵojn, estas la nura en la plej bona stato. La dua, nomata “Hypogeum” (Greka nomo por “Subtera Templo”) kaj elfosita en 1902, estas unika ne nur pro siaj skulptaĵoj sed eĉ pro la okraj desegnoj spiralfarmaj sur la roka plafono. Ĉi tiu Hipogeo konsistas el tri subteraj, hakitaj el la roko, etaĝoj, la meza el kiuj, la plej granda el la tri, entenas, krom aliaj, la orakolĉambbron. Roka ŝtuparo kondukas al la plej malalta etaĝo. Evidentiĝas, ke la loko utilis al du sinsekvaj epokoj. Unue ĝi servis kiel preĝejo kaj orakolkonsultejo; poste, t.e. je la fino de la Ŝtonepoko, ĝi servis kiel enterigejo. Fakte, oni trovis tie la restaĵojn de ĉ. sep mil personoj kovritaj per ruĝa kampotero. Certe, la giganta laboro de ĉi tiu subtera monumento, kies akustikajn ecojn oni ne devas preterlasi, atestas la plej altan kulturon kaj civilizon de tiu prapopolo.

La Neolitika popolo enterigis siajn mortintojn en kavernoj kaj en truegoj hakitaj el la roko; tamen la Bronzepokulo preferis kremacii ilin. Kvan-kam en Malto oni elfosis kadavrojn kaj Neolitikajn kaj Bronzepokajn, ĉiu el ambaŭ specoj montras apartajn ecojn, kaj oni ne trovis specimenojn, kiuj indikas, ke la du specoj iam interedziĝis. Tio do estas la ĉefa kialo por supozi, ke la Neolitikulo malaperis de ĉi tiuj insuloj antaŭ la apero de la Bronzepokulo.

La Fenikoj — La Fenikoj, komercante laŭlonge de la Nordafrika marbordo kaj transe al Sicilio, komencis uzi Malton, kiel havenon kaj rifuĝejon dum la Mediteraneaj ŝtormoj, kaj sekve Malto ŝanĝiĝis en prosperan kolonion. Fakte Diodorus Siculus, la Romana historiisto, kiu en 40 p.K. laŭdis la Insulon kaj menciis, ke ĝi estis kolonio Fenika.

Tre malmultaj specimenoj de Fenikaj konstruaĵoj restas ĉi tie. Sed estas certe, ke ruinoj de antikva templo dediĉita al Aŝtaroto, Fenika diino, staris malantaŭ la fortikaĵo de Sankta Anĝelo. Poste, tiu templo estis dediĉita al dio Junono dum la

Roma epoko. Krome, skribistoj Grekaj kaj Romanaj menciis templon, kiu estis dediĉita al Melkarto, la edzo de Aŝtaroto, apud haveno de Marsaxlokk (pr. Marsaŝlók). Poste, ĉi tiu templo estis dediĉita al Herkuleso. Fakte, estis el dulingva skribaĵo, en Fenika kaj Greka lingvoj, elfosita en Malto dum 1697, ke oni rekonstruis la Fenikan alfabeton. La Fenika skribaĵo montras, ke la gramatiko Fenika ege similas al la nuntempa gramatiko Malta.

La Kartaganoj — Post la konkero de Fenikio per la Persanoj en proksimume la 7-a jarcento a.K., Kartago fariĝis la Ĉefurbo de la Fenika Imperio, kaj sekve ĝi estris eĉ Malton. Oni trovis monerojn kaj surskribaĵojn, kiuj surhavas Fenikajn skribaĵojn. Kiel posedaĵo Fenika dum minimume mil jaroj, Malto restis centro de komerca interŝanĝado kun ĉiu Mediteranea haveno.

La Romanoj — Dum la dua Puni-ka milito en 218 a.K., Romo aneksis al si Malton, kiu fariĝis parto de la Sicilia Provinco; sekve ĝi ĉesis esti la centro komerca de la Mediteraneo; sed ĉi tiun perdon Romo anstataŭigis

*** Volvotigo de Amikeco**

de prof. Ŝ. Hori 90 p. ¥ 750

Biologiaj eseoj
kaj humanaj temoj

*** Japanujo Hieraŭ kaj Hodiaŭ**

40 p. ¥ 120

Informoj bele kaj abunde
ilustritaj

per kuraĝigo por starigi lokajn industriojn, kun eksporta komerco de citrusaj fruktoj, vino, mielo, olivoleo, delikata drapo, punto, ktp. Sub la Romanoj, kvankam grandaj estis la impostoj, Malto prosperis. En proksimume 71 a.K. la Maltanoj plendis al Romo pri la eltordoj de la tiutempa Sicilia Guberniestro Gaius Verres, kiu, pro sia gusto al art-verkoj, eĉ rabis multvaloran eburon el la templo de Junono. Pro tio, Verres, juĝita en Romo kaj persekutita de la mondfama oratoro Cicerono, estis ekzilita.

La Roma Vilao en Rabat, elfosita de la Malta Sir Temi Zammit antaŭ ĉ. 50 jaroj, kaj la apuda Muzeo, entenas fajencojn, vitraĵaron, brelokojn, ilojn kaj statuojn de la Punika kaj de la Roma epokoj. Krome, la Katakomboj en Rabat mem estas enrokaj enterigejoj, ekster la muroj de la antikva urbo, kun siaj labirintoj kaj enmuraj tomboj. Ĉi tie ĉio radiigas la vivon de la okupintoj per la ege interesaj dekoraĵoj kaj skribaĵoj sur la tombŝtonoj.

Sankta Paŭlo — En 60 p.K. okazis la ŝippereo de la Apostolo Sankta Paŭlo, sur la rokojn de la norda bordo, alpuŝigita de la nord-orienta vento. La rakonton de ĉi tiu por ni glora epizodo oni povas legi en la Agoj de la Apostoloj (ĉapitroj 27—28). Sankta Paŭlo restis tri monatojn

ĉi tie kaj, laŭ la Agoj mem, akompanis lin Sankta Luko. Estas menciinde ke ĉiufoje kiam la Maltanoj ekparolas la nomon de la Sanktulo, ili ĉiam aldonas la vortojn: ‘nia Patro’, ĉar li ja estis, kiu konvertis la tiutempajn insulanojn al la Kredo de Kristo, kiu kredo restis ĝis nun, post du mil jaroj, la ununura kredo de la Maltanoj.

La Bizanca Regado. Je la fino de la 4-a jarcento p. K., la Roma Imperio estis dividita en du partoj; la Sicilia Provinco, kaj sekve Malto, aliris al la Orienta Imperio Bizanca.

La Saracenoj. En 870 p.K. la Sicilia Emiro — ĉar tiutempe Sicilio estis regata de Mahometanoj, kiuj alvenis de Nordafriko — sendis ŝiparon por venki Malton. Ĉi tiuj Mahometanoj buĉis la Bizancan garnizonon sen iu malhelpo age de la Maltanoj. Laŭ la malmultenombraj historiaj atestaĵoj el tiu epoko, la Mahometana regado ne estis severa: oni permesis al la Kristana Insularo liberecon de adoro, sed — kontraŭ imposta pago. Unu el la elstaraj faroj de la Saracenoj estis la enfermo de unu flanko de la ĉefurbo, nomante ĝin ‘Mdina’ (arablingve ĝi signifas ‘Urbo’). Laŭ tiutempaj Arabaj dokumentoj, Malto prosperis sub la Saracena regado. Oni ne povas ne mencii ĉi tie, ke la hodiaŭa Malta lingvo estas semida lingvo, kaj certe arabdevena. (*Daŭrigota*)

LA VENĜO DE LA KOLONELO

(El la brazila folkloro)

La jaro estis fluinta prospere kaj s-ro Brás, pia homo neniam forestanta la meson aŭ rozarietpreĝadon okazantan en la ĉirkaŭaĵo de l' vilaĝeto Jataí, estis rikoltinta, je kosto de "mutirões"¹⁾ kaj promesoj, ne malpli ol dek unu sakojn da fazeolo: vera absurdaĵo! Li do venis haste en la vilaĝon vendi la varon. Sed, por ne malplaĉi al la Kolonelo, politika ĉefo kaj en la tuta regiono timiga persono, li ofertis al ĉi tiu la unua la plenĉaron da disponebla legomaĵo.

— Kiom vi volas por la fazeolo, s-ro Brás? — demandis la Kolonelo.

— Po dek unu milrejsoj²⁾ por ĉiu

sako, ĉar ĝi estas por vi, — aldonis la alia.

— Estas farita la negoco. Kunprenu la necesan sakaron, kaj la ŝarĝon mi volas ĉi tie morgaŭ mem. Tiam, kiam la ĉaro tuŝos la deponojn per sia postaĵo, vi ricevos la monon, estante ĉio bonorde.

— Jes, Kolonelo; morgaŭ, ja, se Dio permesos.

*

En la sekvinta tago, tamen s-ro Brás, sin tutan fordonante al la laboro ventoli kaj ensakigi la produkton, estis alparolita de alia aĉetanto pli aŭdaca, kiu proponis al li profit-

SEBASTIÃO ALMEIDA OLIVEIRA, kompilinto kaj reverkinto de tiu ĉi brazilfolkloro rakonto, estas nuntempe unu el la plej elstaraj kleruloj en Brazilo. Kiel notario en malgranda urbo el ŝtato São Paulo, dum preskaŭ kvardek jaroj li povis aŭtodidakte provizi al si vastan konon en la tereno de Sociologio, Folkloro, Antropologio, Filologio kaj Literaturo.

Tre observema, li nelacigeble dediĉis sin al la kompilado de popolaj esprimoj, kio ebligis al li publikigi, en 1940, "Expressões do Populário Sertanejo" (Esprimoj el la Internlanda Folkloro). En la jaro 1948 li publikigis "Folclore e Outros Temas" (Folkloro kaj Aliaj Temoj), riĉenhava kolekto de gravaj studoj siatempe aperintaj en diversaj periodaĵoj.

Konsistigas grandan plezuron la legado de la verkoj de Sebastião Almeida Oliveira, ne nur pro la flueco de lia stilo, sed ankaŭ pro la agrabla tono, en kiu li priskribas morojn, kutimojn, superstiĉojn kaj aliajn manifestiĝojn de la spirito de la internlandaj brazilanoj.

Notinde estas, ke Sebastião Almeida Oliveira estas ankaŭ esperantisto.

La Tradukinto

eton je kvincent rejsoj en ĉiu sako. Ŝanĝema kiel li sola estis, s-ro Brás ne hezitis akcepti la tentantan proponon. Momenton poste, farita kaj finita la negoco, la fazeola ŝarĝo prenis direkton malsaman ol tiu interkonsentita en la antaŭtago.

Kiam la Kolonelo sciigis pri la friponaĵo de s-ro Brás, li fariĝis furiozega: “Homo tia devas morti! La fripono ne plu manĝu fazeolon!” — li kolere determinis. Kaj, senĝene, li planis lin ekstermi senprokraste. Li venigis sian fidindan sateliton, kiu neniam estis malsukcesinta, kaj aranĝis kun li la fatalan taskon. La Kolonelo donos al li, krom tricent milrejsoj per kontanta mono, selitan mulinon kaj ŝargitan karabenon, laŭ la kutimo en tiaspecaj aranĝoj. Li tamen volis la orelon de s-ro Brás, plej malfrue ĝis la morgaŭo.

Li ja povus dormi trankvile, kun unu ruzulo malplie, li pensis en si mem. Sed, jam en la lito, li komencis pripensadi kaj ne sukcesis ekdormi. Mortigi homon nur pro tiel malgrava afero, kiam ekzistas en ĉi tiu vasta mondo tiom da mortigendaj homoj...

Estis jam malfrue en la nokto; la kokoj komencis plioftigi siajn kantojn, kiam la Kolonelo ekdecidis alfronti la aferon, evitante, tiamaniere, la morton de tiu povra terkulturisto, kiu estis tre pia kaj eĉ estimata (oni diradis) en la ĉirkaŭaĵo; ĉar eble tiu

decido kompromitos al li la prestiĝon, kaj konsiderante, plie, ke li ŝparos la elspezojn de tiu entrepreno planita en tiel malbona horo. Li venigis kampan serviston, ordonis al tiu seli lian preferatan ĉevalon kaj, decidema, per senbrida galopo, li direktis sin al la loĝejo de l' bandito: domaĉo kaŝita en unu el tiuj foraj dezertoj, flanke de Cachoeira. Tien alvenante, ankoraŭ je malgranda distanco de l' korto, li ekvidis la selitan mulinon kaj “nian” homon embarasitan per la lastaj preparoj por la venĝa tasko. Delikate kaj eĉ kun certa dozo de afableco, laŭ sia kutimo, la Kolonelo diris al li la celon de sia alveno: ke li decidis rezigni al la “laboro”, ĉar ne decas mortigi similulon nur pro tio, ke li ne plenumis interkonsentitan negocon, ktp. Sed la “komisiito de Kristo”³⁾ rifuzis la proponon: li malkonsentis je sia estro, mastro kaj

Originaloj
de japanaj
esperantistoj

*japana
kvodlibeto*



127 p.
¥ 480

25
stafeto

El letero de nia ĉeĥa reprezentantino

Ne koleru, ke la foton mi sendas nun, sed ĝi ne perdas je sia aktualeco, ĉar temas pri homo, kun kiu mi daŭre kunlaboras en esperantista pacmovado kaj tio ĉio firme koheras kun la movado porpaca de Oomoto kaj ĝenerala enhavo de via revuo, kiun ĉiu en la mondo admiras kaj rekonas. Ĝia delonga kunlaborantino ankaŭ mi estas kaj mia reprezentanteco por la revuo en Ĉeĥoslovakio faras al mi nur altan honoron.

La foto montras, de maldekstre: s-ano O. Knichal, redaktoro de ĈTK; mi, estraranino de MEM; s-ro Anton Balague el



Aŭstrio kun ties kunlaborantino s-anino Sindl, kiujn mi gvidis tra la urbo Praha.

Jana Čichová

ordonanto, dirante, ke li estis tuj forironta; ke li prokrastiĝis iomete preparante la manĝaĵon, ĉar li intencis mortigi la krudulon el embusko; ke, krome, kaj pro tio mem, siaflanke li ne rezignas, ĉar li multe bezonis unu mulinon selitan kiel tiu, nepre bezonis karabenon similan al tiu, kiun li tenas surŝultre, kaj, super ĉio, li tute ne povis senigi sin je tiuj tricent milrejsoj, kiujn la Kolonelo anticipis al li. Kompromiso estas kompromiso, Kolonelo!

Ekzamenante bone la por kaj la kontraŭ, la Kolonelo vidis, ke ne

restis al li alia alternativo ol konsenti pri la argumentoj de sia preferata satelito — cetere, ne sin turnu la sorĉo kontraŭ la sorĉisto — kaj fordonis al li la valoraĵojn, tute senpage, sole nur pro tio, ke li rezignis lastmomente al tiu ne pripensita venĝo.

Kaj s-ro Brás, kiu senscie apenaŭ eskapis de terura kuglego de malantaŭe, ofte vizitis plu la vilaĝeton, indiferenta al la kritikoj pri li svarmantaj, kaj, super ĉio, certa, ke li donis bonan lecionon al la ruza Kolonelo.

Tradukis Prof. Benedicto Silva

1) Mutirões — En la brazila kamparo, kolektiva helplaboro farita senpage de najbaroj al terkulturisto, ĝenerale je sabatoj. Elparolu: muĉiro'is, kun nazala "o".

2) Milrejso — Antikva brazila monunujo, hodiaŭ nomata "Kruzejro".

3) Komisiito de Kristo — Tiel estas nomata, en plej krudaj regionoj de l' brazila internlando, tiu, kiu profesie mortigas homon, laŭ alies ordono. Satelito. Portugal-lingve: Empreiteiro de Cristo.

La Trad.

FRAGMENTO

(El “*Senrezulta dialogo*”, *versa sceno*)

POETO

Fiero intelekta vin blindigas,
sklavigas vin, al materio ligas
kaj vanas poz’ observa al ĉielo,
vi vivas fakte en mallum’ de kelo.

SCIENCULO

Sentumoj kvin, ne ŝajn’, ne *sent’* min gvidas.
Pri via fantazi’ scienco ridas.
Cent instrumentoj, mil teknikaj iloj
la veron sondis en prapatroj, filoj.
Scienc’ moderna post esplor’ senfina
asertas : *Homo estas senanima.*

POETO

Doktrino via sub la mask’ de l’ Scio
jam estas — *religi’ de l’ Materio.*
Dogmaro ĝia levas super Homon
ne intelekton, sed nur la — atomon.
Dirante “materio ne pereas”
vi pravas, tamen vi ANIMON neas,
ĉar mankas ĝuste *sesa el sentumoj*
ĉe Scienculo por — internaj lumoj.
Vin erarigas ŝajna ver’ : *fiktivo.*
Sed vivsimptom’ ne estas mem la VIVO!

SCIENCULO

Tuj sekvos la mirinda fefabelo
pri la Sinjor' longbarba de l' ĈIELO.

POETO

PRAINTELEKT' kun Volo kaj kun Povo
videblon kreis per la leĝ' de l' movo ;
do PENSO kaj PLENUMO, fortoduo
forminte VIVON iĝis — TRIUNUO.
Ĉi triunuo estas — VIV' KREANTA
kun fort' *spirita*, korpo *varianta*.
Do ĉio : VIVO, MONDO, ĈIELO,
mil fenomenoj kun kaŝita celo
nur estas — *reflekt'* pri l' KREANTA VIVO.

SCIENCULO

Spegula bildo estas nur — *fiktivo*.

POETO

Eraro ! Ĉiam montras speguleto
abstraktan bildon de l' real' : *konkreto*.
Ĉar bild' ne estas kaptebla permane,
vi neas la realon, sed nur vane. . .
La VIVO estas *tial* ĉiopova,
el VIVO venas *tial* vivo nova,
ĉar en sennombraj formoj rege leĝas
la FORTODUO kun KREAĴ, kaj reĝas.
La elementoj de l' Eterna Vivo :
anim' kaj *materi'* de l' EFEKTIVO.
Animo estas Penso kaj Plenumo ;

nur ili estas materi', nur humo,
en kiu tial Vol' kaj Povo ĝermas,
ĉar ĝi interne diajn ecojn fermas.
Sen tiu FORT' VIVIGA vanus kovo
eĉ por sensenca celo : mov' por movo.
... ..
... ..

CIRKA ĈEVALO

Ĉevalo cirka, modpasinte aĝa,
sintrene trotas en la sabla rondo.
La penda kapo plendas pri la aĉa
kadukon truda tedo en ĉi mondo. . .
sed se subita “ĉindra bum !” orĥestra
stimulas ĝin sub lumo de l' areno,
ĝi tuj reviglas ĉevalide estra
dum stumbla kuro kun sendenta ĥeno. . .
De vanto ventumate iĝas blinda
la ĉevalaĉo cirka. . . kompatinda.

Poeto modpasinta tre konscias
pri tedaj migro, spleno, morno,
kiam la krei-volo agonias
kaj restas for la sonĝoj dum sendormo,
sed se subita “ĉindra bum !” publika
lin vantovente vokas al forumo,
tuj ĉevalide ĥenas li komika
dum stulta kuro en l' arena lumo. . .
nur poste pikas sin per penso pinta :
“Ci, ĉevalaĉo cirka. . . kompatinda !”

KABE : WARINGHIEN

Tradukado kaj Originala Verkado ; Efikoj sur la Stilon

Komparante stilojn de Esperantaj verkistoj (“Oomoto”, Jan.-Feb., 1965), oni devas konsideri ankaŭ tiun ĉi aferon : Ĉu la koncernata verkanto estas konata ĉefe kiel tradukanto aŭ kiel originala prozisto? Ni prenu du homojn por tia kompara konsidero.

KABE : Juĝante per verketoj konataj de ni, el la Angla, Franca, kaj Germana, Kabe ne multe deviis de tradukita teksto. Ne estas tute kontentige, kompari tradukon kun originala verkaĵo. Tradukanto devas redoni kiel eble plej fidinde la sencon kaj stilon de aŭtoro, sekvante ankaŭ la frazarangon, kie tio estas konforma kun la spirito de la lingvo en kiu li tradukas. Originala verkanto ne laboras sub tiuj kondiĉoj : li libere uzas vortojn, vort-kombinojn kaj frazefektojn laŭ la propra kaprico, kaj, en Esperanto, kreas novajn kunmetaĵojn kaj ludas kun vortelementoj indulge al siaj propraj manierismoj. Tion ni rimarkas ĉe Waringhien, kiu krome en sia “Eseoj” iom ofte fabrikas por si trafajn aliteraciojn, kernecajn sentencojn kun rimo

(“suke, ne seke” ; “taŭga laŭdo”, “laste sed ne lasta”).

Katenita al la originala teksto, do ne povante montri aparte-personecan esprimarton, Kabe donis tradukaĵon lingve ortodoksan, klasike puran kaj facile legeblan. Ĉar malestas lertaj sed neordinaraj vort- kaj frazturniĝoj, tiaj logaĵoj ne tiras atenton for de la rakonto mem. Kutime ordinara vortuzado karakterizas la tutan verkon.

WARINGHIEN, male, verkis “Eseoj” kun aldonita avantaĝo de kvindekjara lingva plielastiĝo kaj longa sperto en la kampo de originala lingvopraktiko. Jardekoj da pli-malpli polemika plumlaboro faris akran klingon al lia tranĉa aŭ penetre impresa stilo. Lia rezonada kapablo evoluiĝis ĝis alta nivelo pro liaj mil kolonoj da defenda-ataka rebataĵo en lingvistikaj kaj priliteraturaj diskutoj. Lia natura sprito kaj sagaco varpe-vefte enteksiĝas tra la tuta esekompilo. Tion li okaze uzas kun admiriga aŭ frakasa efekto. Homo de spirito kaj intelekto tre multfaceta kaj vastescia, li sin esprimas per flue komprenata formo, en kiun neĝustaj

influoj de diverslingvaj konoj nur sporadete sin trudas.

El la sekvantaj citaĵoj ni aŭdas la aŭtentajn tonojn de flue funkcianta spirito; ni vidas en ili la formojn fulme fabrikatajn de virtuoza vestanto de l' propraj ideoj, sentoj, observoj:

“Por mi ĉiu vorto estas malgranda sonorileto, kiun mi provas ĉiam kun scivolo, kiu eksonas, vibras aŭ tintas ĉe mia orelo kun individua tembro, kvazaŭ ia muzika personeto, ia gamfeino. Mi amas ludi kun ili, miksi ilin laŭ la kaprico, por eltrovi kian kunsonoron ili donos, ĉu flatan, ĉu surprizan, ĉu eĉ orelsiran. . . . Jen kial mi ne povas min deteni kaj riĉigis mian Esperantan liron per kelkaj fremdaj kordoj”. (“Eseoj”, p. 114).

“Por Lanti, Esperanto estis vere la plej nova invento de la ‘teknika menso’, invento konvena al epoko de terskala ekonomiko. Kaj ĝin li uzis kun la duobla zorgo, kiel eble plej sennaciigi sian stilon, kaj kiel eble plej raciigi la admirindan maŝinon konstruitan de Zamenhof. Tiuj du zorgoj certigis la puron kaj ĝuston de lia stilo. Verdire, ĝi ne montras la vibran emociecon de la Baghy-romanoj, aŭ la artisman riĉon de la Kalocsay-poezio. Sed rapidpaŝa, rektira kaj alcela, ĝi trafas, tranĉas aŭ

batas kun la akreco de bona klingo. Lanti ĉiam fieris, ke li estis manlaborulo; lia stilo estas la plej efika, la plej polurita el liaj iloj”. (p. 102).

“La Angloj, kiuj ankoraŭ nun suferas je sia longdaŭra puritana ‘repuŝado’, tiucele inventis la humoron ĝuste por senprajmigi la eksplodemon de la pasioj kaj povi ilin manipuli sendanĝere. . . la detektivaj verkoj tiel konsente akomodigas al la humoro, kiel malafable toleras la ampentradon”. (p. 192).

“La delikata histo de la lipoj, ĝiaj subtilaj palpiloj, ĝiaj multaj muskoletoj kaj ties lertaj streĉoj kaj malstreĉoj facile naskas raran kaj plezurigan senton, kiam kuniĝas la lipoj de du ne tro maljunaj personoj” (p. 208).

Oni povus citi centon da simile frapaj atestotekstoj, kiuj senskarese elmontras la agadon de senpera kreanto.

Kial do ĝuste kompari la du verkistojn? Waringhien estas alte dotita aŭtoro. Kabe ne verkis originale; li sin dediĉis al la tradukarto. Ni nur povas konjekti pri tio, ĝis kioma nivelo li atingus, se li estus lasinta fali la bridon de rigora tekstosekvado, por floradi en krelibereco, farante al si belprozajn formojn de sia sendube riĉa penskapablo.

Pri la ĉina poemo en **La Rakonto pri Aojagi**¹⁾

Laŭ mia peto, s-ro Armand Su unue redonis la proksimuman elparolon de la poemo, per transskribo laŭ la Esperanto-ortografio :

Gun zi van sun zu ho ĉen	公子王孫逐后塵
Lju ĝu ĉue le di luo ĝin	綠珠垂淚滴羅巾
Ho men i ĵu ŝen ĵu haj	侯門一入深如海
Zun ci siaŭ lan ŝi lu ĵen	從此蕭郎是路人

Kaj li skribas : “Fakte, la poemo, kiun Tomotada riskis sendi al sia amatino, *ne* estis de li verkita, sed nur transskribita. La vera aŭtoro de tiu poemo estas la ĉino Cue Giaŭ (崔郊) el Tang-Dinastio.

“Cue Giaŭ ne estis fama poeto siatempe, kaj tiu poemo ne troviĝas en la mondfama ĉina antologio *300 Poemoj el Tang-Dinastio* (「唐詩三百首」). La datoj de liaj naskiĝo kaj morto estas nekonataj al ni. Tamen, laŭ diversaj historiaj fontoj mi povas supozi, ke li naskiĝis fine de la 8-a jarcento p.K. kaj mortis meze de la 9-a jarcento.

“La citita poemo estis lia plej fama poemo kaj estis menciita en diversaj ĉinaj antikvaj libroj. Laŭ supozo, tiu poemo estis verkita inter la jaroj 810–815.

“Por certiĝi pri la vera aŭtoro de tiu poemo, mi traserĉis diversajn antikvajjn librojn. Jen en la fama *Komentoj pri la Poezio el la Tuta Tang-Dinastio* (「全唐詩話」) de Ju Baŭ (尤袤, 1127–1194) el Song-Dinastio mi trovis la komentojn pri tiu ĉi poemo. La eldono konsultita de mi estis de 1770. Sub la titolo ‘Cue Giaŭ’ (la 4-a volumo, p. 28) estas jena rakonteto. Mi permesas al mi traduki ĝin el la antikva ĉina lingvo :

“Giaŭ loĝis en Han(漢). Li havis tre belan servistinon, kiu scipovis kanti kaj ludi muzikilojn. Fariĝinte malriĉa, li forvendis la servistinon al la liensueo* por 410,000 cienoj**. La liensueo tre dorlotis ŝin. Cue Giaŭ sopiradis al ŝi senĉese. Foje, la servistino iris al subuloj de l’ liensueo okaze de la Festo de Malvarma Manĝo*** kaj renkontis Giaŭ surĉevale en ombro de salikarbo. Ŝi eklarmis kaj ĵuris al li sian

1) Daŭrigo de la antaŭlasta numero, p. 54.



“Tamasudare”, Kajero 3. (Vd p. 114)

fidelecon. Cue dediĉis al ŝi poemon :
‘La juna princo sekvas ŝin je ĉiu paŝo / Ŝi malsekigis la naztukon larmogute / Interne de l’ palac’ ŝi kvazaŭ maren dronis / De tiam sola restas mi kaj fremda tute’. Iu ĵaluzulo de Giaŭ transskribis la poemon kaj metis ĝin sur la seĝon de la liensŭeo. Leginte la poemon, la liensŭeo ordonis venigi Cue Giaŭ. Liaj subuloj ne sciis, kio estas lia intenco. Vidinte Giaŭ, li manpremis lin kaj demandis : “Ĉu Sinjoro verkis ‘Interne de l’ palac’ ŝi kvazaŭ maren dronis / De tiam sola restas mi kaj fremda tute’ ? ” Li ordonis la servistaron kuniri kun Cue Giaŭ kaj ankoraŭ donacis al ŝi lit-tendon, kurtenon kaj skatolon kun kosmeti-

kaĵoj por plimultiĝi ŝiajn ornamaĵojn.”

“Cetere, en la *Granda Vortaro de Ĉinaj Nomoj* (「中国人名大辞典」, Ŝanhajo, 1921) mi legis sub ‘Cue Giaŭ’, ke ne li, sed lia onklino havis servistaron, al kiu li dediĉis tiun faman poemon. Do, nun mi ankoraŭ ne povas diri, kiu fonto estas pli fidinda. Tamen, unu fakto estas tute senduba : la poemo estis verkita de Cue Giaŭ, sed ne de iu Tomotada.

“Cetere, en la poemo estas du ĉinaj nomoj : 綠珠 kaj 蕭郎. Mi tradukis ilin nur per ‘ŝi’ kaj ‘mi’ (ankaŭ L. Hearn tiel tradukis), sed ambaŭ nomoj bezonas iom da klarigoj :

“綠珠 (Lju Ĝu) estis belega ĉina kantistino kaj dancistino el la 4-a

**Lienŭeo* (連帥) estis titolo de altrangulo, kies potenco eble egalis al tiu de gubernatoro.

***Cieno* (錢) estis antikva ĉina mon-unuo. Ĝi estis kupra monero kun randa trueto en la mezo.

****La Festo de Malvarma Manĝo* (寒食節) estas antikva ĉina festo (la 106-a aŭ 107-a tago post la Vintra Solstico). La Festo daŭras 1-3 tagojn, dum kiu(j) oni manĝas nur malvarmajn manĝaĵojn.

jarcento. Ŝi servis en la domo de la tiama potenculo Ŝi Zun. Ŝi Zun estis poste mortigita de alia potenculo Sun Sio nur pro ŝi. Por elmontri sian fidelcon al Ŝi Zun, ŝi mortigis sin por ne esti posedata de Sun Sio.

“蕭郎 (Siaŭ lan) estis imperiestro de Liang-Dinastio el la 6-a jarcento. Lia familia nomo estis Siaŭ (蕭). ‘Lan’ (郎) estas aldonita al familia nomo de viro por esprimi estimon. Antaŭ imperiestriĝo, kiel junulo li estis laŭdata de la tiama potenculo Van Gien, ke li havas virecan aspekton kaj certe faros grandajn aferojn estonte. De tiam Siaŭ lan (蕭郎) simbole signifas viron amatan de virino.


“La poeto Cue Giaŭ citis ambaŭ nomojn en sia poemo por simbole kompari ilin kun li kaj lia amatino.” (P.S. de Armand Su: Dum mia esplorado pri la fonto de la poemo min multe helpis la olda ĉina erudiciulo S-ro Ĝu Ĝu-Jü, specialisto pri la ĉina klasiko. Al li mi esprimas mian tutkoran dankon !)

*

La komentoj de Su tre interesis min. Sen ia dubo la japana aŭtoro “transskribis” la poemon. Sed leviĝis en mia menso la demando, ĉu ne estus Hearn, kiu prenis tiun poemon el iu alia fontoverko — ĉar li skribas en la mezo de sia rakonto pri “Aojagi”: “Ĉi tie, en la Japana originalo, estas stranga interrompo en la natura irado de la rakonto, kiu, pro tio, restas ege nekonsekvenca. [. . .] Mi ne povas replenigi liajn ellasojn, aŭ ripari lian miskonstruon; sed mi devas aŭdaci enmeti kelkajn klarigajn detalojn, sen kiuj la resto de la rakonto ne povus esti kohera”, kaj nur poste venas la cito de la poemo (vd p. 50 en la antaŭlasta n-ro). Mi do bezonis legi la praverkon, laŭ kiu Hearn tradukante verkis sian rakonton pri “Aojagi”.

Por informiĝo, mi tuj skribis al mia amiko H. Macuura en Macue, Ŝimane-gubernio. Macue estas la urbo, kie Hearn iam loĝis (1890–1891) kaj kie nun restas lia Memordomo. Mia amiko kontaktiĝis kun prof. Mikio Ohara de Ŝimane-Universitato kaj komunikis al mi ties respondon, ke Hearn verkis sian rakonton laŭ *Rjuujoo Reijoo* (「柳情靈妖」) en “Tamasudare” (「玉すだれ」), verko de Cuĵidoo Ĉoohuu (辻堂兆風); ke ĉiuj japanaj tekstoj, kiujn Hearn utiligis por sia verkado estas presitaj en la Kompleta Tradukita Verkaro de Lafcadio Hearn, kaj la japanaj libroj, kiujn li uzis, estas konservataj en la biblioteko de Tojama-Universitato, en Tojama.

Dume mia amiko Kikunobu Matuba, Jokosuka, kontaktigis min kun s-ano Joŝio Koseki, kiu estas profesoro de Meĵi-Universitato, Tokio kaj



Paĝoj de la rakonto *Rjuusei no Reijoo* (pri kiu titolo vd la piednoton 2)

kies kolego, prof. Nacuki Mijaĵima de la sama universitato estas specialisto pri la japana klasika literaturo kaj aparte pri la verkoj de Hearn. Bonŝance por mi, prof. Mijaĵima posedis ĉiujn paĝojn de la originalaj ‘bazaj’ tekstoj, fotostate kopiitajn de li per speciala vizito ĉe la Hearn-Biblioteko de Tojama-Universitato. Li ne nur disponigis al mi la koncernajn paĝojn, sed ankaŭ donis al mi valoran instruon pere de prof. Koseki.

Antaŭ mi kuŝas nun la reproduktaĵoj de “Antaŭparolo” al “Tamasudare” kaj de la rakontoteksto de *Rjuujoo Reijoo* 「柳情靈妖」²⁾, la 4-a rakonto en la Kajero 3 de “Tamasudare”. Pri la aŭtoro kaj la eldon-jaro

2) 「柳情靈妖」, laŭ la enket-respondo de la Nacia Biblioteko de la Parlamentejo, legiĝas *Rjuusei no Reijoo*: tion mi konfirmis laŭ la fonetikaj kanaoj apudmetitaj al la titolo en la originalo (kvankam iom malfacile rekoneblaj en la faksimilo). Ĉu do temas pri ksilografata misaĵo kaj la korekta formo kiel laŭ la senco tiel laŭ la prononco devus esti 柳精靈妖 anstataŭ 柳情靈妖 aŭ — ĉu la aŭtoro donis al la ĉi-lastaj formo tiun specialan legmanieron? Tion mi ne scias. Ĉiokaze, tamen, ĉar la dua formo de la titolo, kia en la originalo, estas represita en la Kompletaj Tradukita Verkaro de L. Hearn, mi ankaŭ uzas ĝin ĉi tie, sed laŭ ĝia propra legmaniero: *Rjuujoo Reijoo*. T.e., formale la titolo estu legata kiel la aŭtoro mem intencis: *Rjuusei no Reijoo*.

mi prefere citos la vortojn de prof. Koseki, el lia afabla letero al mi :

“En tiu antaŭparolo la aŭtoro estas prezentita kiel 濃丞大垣乃産辻堂氏兆風子 kaj en la fino la skribinto kun la nomo 挙堂 metis la daton de eldono kiel 甲申孟春.

“El tio oni povas scii ke la aŭtoro 辻堂兆風 naskiĝis (kaj eble loĝis) en urbo Oogaki de Mino-provinco. Pri la eldon-jaro : la jaro nomita 甲申 revenis kvarfoje dum la Edo-epoko, t.e. unue en la 11-a jaro de Kan’ei (1634), due en la 7-a de Genroku (1694), trie en la 4-a de Hooreki (1754), kaj fine en la 11-a de Bunka (1814). El ili la plej probable estus, laŭ prof. Mijaĵima, ‘la 4-a de Hooreki’ (1754), ĉar ĉirkaŭ tiu tempo multaj tiuspecaj rakontolibroj estis eldonitaj”.

La datoj de la naskiĝo kaj morto de l’ aŭtoro ne estas konataj.

Nu, pri la ĉina poemo “transskribita”.

En la faksimilo de la rakontoteksto mi trovis la poemon presita kun tri prezeraroj — supozeble la ksilografaj leg- kaj ĉiz-eraroj (kiaj cetere ne mankas aliloke) : en la 1-a verso estas presita la ideograma kunmetaĵo 後塵, kiu devas esti 后塵; en la 3-a v. 候人, kiu devas esti 侯人; en la 4-a v. 從是, kiu devas esti 從此. La du unuaj eraroj estis jam korektitaj en la komentaria libro, el kiu mi citis la ĉinan verskvaron, kaj la lastan mi korektis laŭ la rimarkigo de Su. Do, la teksto de la poemo presita en la antaŭlasta numero (p. 54), kaj ĉi-supre represita, estas tute korekta laŭ la ĉina originalo.

Kaj en sia rakonto pri “Aojagi” Hearn skribis : “*en la formo de Ĉina poemo li verkis leteron*”. Sed en la originala teksto mi legas : “*li verkis leteron kaj sendis ĝin al ŝi pere de konvena persono elserĉita. Ĉe la fino de tiu letero li skribis : (la poemo)*”. Li — Tomotada, la heroo, en la komenco de l’ originala teksto estas prezentita kiel “kiu gajnis bonan reputacion per verkado kaj posedis abundan scion pri la japana kaj ĉina klasikoj” (「文章に名を得, 和漢の才に富みたり」). Do ne estas mirinde, ke “li skribis” ĉinan poemon ĉe la fino de sia letero, por sugeste, des pli draste, komuniki siajn sentojn. Kaj kion Su citis (ĉi-supre) el la “Komentoj pri la Poezio el la Tuta Tang-Dinastio”, tio permesas al ni preskaŭ tute certigi, ke la aŭtoro siatempe estis leginta kaj sciinta ĝin per iu eldono de tiu komentaria libro, pli malnova ol tiu de 1770, kiun Su konsultis; kaj li adaptis ĝin — la temon pri “poezia virto” — sub la nova formo de sia rakonto, kiu cetere estas tute japana kaj originala. Do estas neniu alia ol li, la aŭtoro, kiu “posedis abundan scion pri la ĉina klasiko”. Se ne, kiel do povus okazi, ke en lia

rakonto estas reproduktitaj “Lju Ĝu” kaj “Ŝiaŭ lan” kiel *belulino* kaj *belulo*; ke la sola vorto “salikarbo” trovebla, sen ia kromsignifo, en la citaĵo de Su (vd p. 112) verŝajne motivis la titolon *Rjuŭĵoo Reijoo* (Salik-spirita Misteraĵo) kun la enhavo, kies finan klimakson la aŭtoro faras per adapto de la japana folkloro pri la salik-spirita enkorpiĝinto kiel homo ?³⁾ Cetere, en tiu rakonto *Rjuŭĵoo Reijoo* la bela junulino ne havas propran nomon kaj estas rakontata ĉiam kiel “la knabino”; sed en sia versio, Hearn donis al ŝi la nomon *Aojagi* (Verda saliko) !

La “abunda scio pri la ĉina klasiko” estis la komuna trajto de niaj malnovtempaj verkistoj ĝenerale. Adapto de ĉinaj verkoj eĉ la japanajn estis tre ĝenerala afero ĉe ili : nur la literatura valoro dependis, kompreneble, de tio, kiel oni adaptis ilin per formo ne traduka, sed japane originala. Ĝuste pri tia afero prof. Mijaĵima skribas (laŭ mia esp-igo) :

“Rilate la adaptan verkadon — estis tia tendenco en tiu tempo, ke la verkistoj povis fieri pri sia talento eĉ ekskluzive pro ia teknika lerteco, per kiu ili adaptis ĉinajn novelojn, laŭ iuj elektitaj epoko, loko kaj homoj de Japanujo, en la japanajn per formo pli-malpli kohera, kaj ankaŭ ĉe la inteligentuloj kapablaj mem legi ilin en la ĉina originalo, ke ili legis la japanajn, kaj tenante en sia menso la intrigon de l’ originalo, atendis kaj aprecis la teknikan lertecon de l’ adapta verkado, kaj denove ĉe la verkistoj, ke ili ne nur povis legi kaj digesti la ĉinan klasikon, sed ankaŭ povis riveli, interplekte kun la esprimoj de sia verko, parton de sia profunda scio pri la japana klasiko, pro kio ili povis kaŝe fieri kaj esti kontentaj”⁴⁾.

3) Ekz-e, la tragika popollegendo pri salik-spirita virino, kiu devas disiĝi de sia amata filo je la horo kiam oni dehakas kaj forportas ŝian arbon (por fari trabon), konsistigas unu el la plej dramaj scenoj de la bunraka (pup teatra) kaj kabuka (teatra) ĵoruro, konata per la populara titolo 「三十三間堂棟木の由来」 aŭ “La Origino pri la Firstotrabo de Sanjŝangen-dō”. (Sanjŝangen-dō estas la fama budhisma templo en Kioto, en kiu staras en densaj vicoj la mil kaj unu — precize tiom ! — plenstaturaj statuoj de Kannon ; konstruita en 1164 kaj rekonstruita en 1266). La unua publika prezentado de tiu ĵoruro okazis en 1760 — do ses jarojn post la de ni supozata eldonjaro de “Tamasudare”. Sed la popollegendo mem delonge ekzistis en tiu tempo, tiel ke oni nur adaptis ĝin en la ĵoruran tekston aŭ en la rakonton *Rjuŭĵoo Reijoo*. Estus superflue aldoni, ke la homfigura enkarniĝo de planta spirito estas ferakonta elpenŝaĵo kaj estas tute senbaza laŭ la spiritismo kaj de Oomoto kaj de Allan Kardec.

4) El : 宮島夏樹著「小泉八雲と上田秋成一雨月の二作品をめぐって」。明治大学発行「日本文学研究」18号(1961) 所載。(“La Studo pri Japana Literaturo”, vol. 18, 1961, eld. de Meiji-Universitato, Tokio).

Tio signifas, ke la plejparto de niaj malnovtempaj kleruloj posedis abundan scion pri la ĉina klasiko. Kaj kiuj legis ekzemple la rakonton *Rjuuĵoo Reijoo* de Ĉoohuu, aprecis ĝin, bone sciante, ke en ĝi la poemo, kiun la junulo aldonis al sia letero, estas el la ĉina poezia antologio. Hodiaŭ tio estas ebla nur por specialistoj.

Cetere, la transskribo de famaj ĉinaj poemoj en japanaj verkoj ne pli konsistigus plagiaton ol la cito de latinaj aŭ grekaj famaj versoj, kiel ĉi tion faras eĉ nuntempe kelkaj esperantistoj en sia originala (esperanta) verko !

*

Pri la tradukita formo de la ĉina poemo Su komentis :

“La komentarioj de Lafcadio Hearn pri ĉi tiu poemo estas ĝenerale korektaj. Tamen la 3-a verso (en esp. : *Sed ĉe l’ moŝta sinjoro unu fojon enamiĝinta en ŝin, la sopiro estas tiel profunda kiel maro*) estis absolute erare komentariita. La vera senco estas : Post eniro, la palaco ekŝajnis tiel profunda kiel maro. Tio estas : ŝi neniam povos eliri el la palaco”.

Tia mistraduko de Hearn troviĝas ankaŭ en la 1-a kaj 2-a versoj de la tankao de la junulo : (en esp.) *Estante sur mia vojo por fari viziton, mi trovis kion mi prenis por floro*. La vera senco estas : Ĉu ne estas vi la (ĝusta) floro, kiun mi serĉis — tiel pensante (aŭ ravite) mi ja pasigis tagon.

Evidente *La Rakonto pri Aojagi* kaj *Rjuuĵoo Reijoo* estas “ĝemeloj”, sed tio ne signifas, ke unu estas la preciza portreto de l’ alia. Ekzemple, la originala rakonto komenciĝas per cito de kelkaj samurajaj familinomoj, kiuj estas historie famaj kaj aludas al la tempo de Ŭnin-milito (1467-1477), kaj la juna samurajo Tomotada — dum lia mastro kaj li kun ĉiuj aliaj soldatoj bivakas sur la bataalkampo kaj pasigas senbatalajn tagojn — elŝteliĝas unu tagon por viziti sian patrinon, kaj lin trafas neĝstormo survoje, tiel ke li renkontiĝas kun bela knabino ĉe la ŝirmejo. Sed tiu historia aludo tute for- estas el la versio de Hearn, en kiu simple “oni sendis lin kun sekreta misio”. Jen kial Hearn embarasiĝis kaj devis skribi, en la mezo de sia rakonto, “Ĉi tie, en la Japana originalo, estas stranga interrompo (vd. la jam cititan ĉi-supre). Sed en la originalo ne okazas tia “interrompo” ; okazas nur subita ŝanĝo de la scenoj : (laŭ libera trad.) “Baldaŭ la fortikaĵoj de Jamana kaj Hosokaŭa falis, kaj Joŝimune (la mastro) eniris la ĉefurbon (Kioto), kie li kaj lia soldataro restadis ĉe la templo Tooĵi”, kaj unu nokton oni forprenas la kaŝitan amatinon de Tomotada en la palacon. . .

Cetere, la puritana plumo de Hearn intence ellasis unu detalon, en kiu

la ĉarma knabino ankaŭ trinkas iom da sakeo, kaj post interŝanĝo de am-versoj kaj -vortoj kun la junulo, ŝi volonte — kvankam honteme, tamen kun la konsento de la benantaj gepatroj — akceptas lian svatiĝon kaj kun li “kuŝiĝas en unu sama lito”, dirante, “Mi jam disponigis min al vi ; faru al mi kiel plaĉas al vi ! ”

Malgraŭ ĉio, la rakonto de Hearn, kiel ĉiuj aliaj similaj el lia plumo, estas *fidela* laŭ la *spirito* de la japana originalo. Mi povas citi multe da fortaj punktoj de lia rakonto, sed tio apartenas al alia temo.

T. Nakamura

Danko

La elfaron de ĉi tiu artikolo mi ŝuldas al la samideana helpemo de miaj amikoj kaj al la bonvola kunlaboro de kelkaj universitataj profesoroj, kies nomojn mi citis sialoke en la artikolo. Ĉi tie mi permesas al mi aldoni la nomojn de s-ano Masatoŝi Hukai en Tojama kaj d-ro Ŝigeo Takase de Tojama-Universitato, kiuj ankaŭ havigis al mi la fotostatan reproduktaĵon de la originala teksto.

Al ili ĉiuj mi esprimas mian plej sinceran kaj profundan dankon !

Apartan dankon al A. Su, kiu sciigis al mi, senklerulo, la veran aŭtoron de la ĉina poemo, kaj ankaŭ al K. Matuba, kiu — anstataŭ mi — memvole skribis eĉ al la Nacia Biblioteko de la Parlamentejo. La bibliografia enket-fako de tiu Biblioteko donis al ni detalan kaj precizan informon. Al la koncernato — mian tutkoran dankon !

T. N.

Ĵoji Cubota

Trad. Kiuzo Ito

La Infanoj en Vento (novelo)

Tajpe ofsetita
10.4 cm × 17.2 cm
72 p.

Prezo : ¥ 300
(1.00 us. dol.)
Sendkostoj : ¥ 35

Mendu ĉe :

Ĉiama Grupo, ĉe s-ro T. Takesita,
Kamigenroku, Katuyama-si, Hukui-ken, Japanujo

REGNO DE LA SUNO!

KOMENTARIOJ PRI “REGNO DE LA SUNO”

Aĥnaton — heroo de ĉi tiu rakonto estis ĝuste egipta faraono Amenhotep IV el XVIII-a dinastio en periodo de t. nom. “Nova Ŝtato” inter 1580-1350 ant. n.e.

Lia personeco estas tre interesa pro tio, ke li kreis unuan en la mondo religion de Unusola Dio, atarigante kulton de Aton (=suna disko), abstracia Dio sen teraj alflugajoj.

Komence li havis politikan intencon: rompi potencon de pastroj el Teboj kun ilia dio Amon-Ra, sed poste li fariĝis arda profeto kaj gvidanto de reformita kulto. Li eĉ nomis sin mem Aĥnaton, kiu signifas: “disko de Aton”.

Ankaŭ pro sia pacifismo li estas alloga por la historistudado: unua en la mondo li rifuzis gvidi la militojn. Krome — li estis granda amanto de la bel-arto kaj ilia protektanto, pri kio atestis multaj pitoreskaj pentraĵoj en ruinoj de Tel-El-Amarna.

Tiuj pentraĵoj montras ke li vere ĝuis la vivon kune kun sia edzino, Nefertite, en ĉirkaŭaĵo bela kaj kvietaj, inter floroj, arto-verkoj kaj artistoj. Li estis ankaŭ aŭtoro de belaj himnoj je la gloro de Aton.

—Julia Pióro

*

Kiu vi estas, Nefertite, se ne rebrilo de suno ĉie reganta? Kiu vi estas, Nefertite, se ne luma rondeto, kiun leviĝanta suno milde kaj timide metas sur la marmora benko en ĝardeno de faraono? Kiu vi estas se ne kiso de blindiga sunradio per kiu en zenito ĉiopova Ra karesas svenintajn florojn?

Nefertite ekstaris kaj iris tra ĝardeno renkonte al sia edzo. Longaj “sunaj serpentoj” volviĝis ĉirkaŭ ŝia figuro — tiuj serpentoj kiuj honoris nur reĝan sangon kaj devenis el suno, el la plej fortaj radioj de suno en zenito. Tiel vidis ŝin per admirantaj okuloj sinjoro de du landoj (Supra kaj Malsupra Egipto), faraono Aĥnaton. Li sidis sur la teraso kaj verkis novan himnon al Aton, al tiu kiu unusola ekzistas, kiu kreas kaj instigas al kreado, spirita suno prilumiganta Egipton.

Li vidis ŝin irantan tra densaĵo de radioj, simile al boato faranta vojon

*) Esperantolingva pola verkistino kaj la aŭtoro de “El Tero kaj Etero”, eldonita de STAFETO, 1964.

inter oraj kanoj ĉebordaj. Venu, Nefertite, la plej amata edzino ! Ĉar al koro de faraono enŝteliĝis ĉagreno, minaca malamiko de suna regno ; ĉar en liaj oreloj ankoraŭ sonis stertoroj de mortige laca sendito el Jerozolimo, kiu alportis novaĵojn de garnizona komandanto :

“Diru al reĝo la veron : la tuta ŝtato de mia reĝo kaj sinjoro staras antaŭ ruino.” (Aŭtentika ; skribaĵo trovita en ruino de Tel-el-Amarna, ne fore de nuntempa Kairo).

Ĉu tiu judea komandanto havas vere sobran menson ? Kio povus minaci al lando, sur kies trono sidas servisto de ĉiopova Suno-Aton ? Kio povus minaci al regno de la suno ? Ĉu li, faraono ne amas pacon, ĉu li ne dissemadis ĉie sanktan instruon pri Aton ?

Sed garnizonoj en subiĝintaj landoj senĉese kaj obstine faris alarmon : siriaj princoj ribeladis kaj atakis egiptajn gardejojn. Iliaj soldatoj buĉadis garnizonojn en Izraelo, Sirio, Nubio. . . Helpon, granda reĝo ! Tiam ĉagreno premis bonan koron de faraono, kaj li sendis al Jerozolimo, Meggido, Askalon, Gezer, bonfarantajn radiojn de ĉiopova Aton, dio de suno, amo kaj vivĝojo. Bedaŭrinde ! La fortresoj falis unu post alia, kaj mortige lacaj senditoj stertoris en polvo de larĝaj vojoj. Faraono ne volis ilin akcepti. Alarmoj de malkvietaj militestroj ne povu ekskui solenan kaj kvietan atmosferon de suna regno.

Ho, kiel malfacile estas teni en sia koro fortan fidon ke Aton, sinjoro de nevideblaj kaj videblaj mondoj, fine venkos ! Ne tuj, nek morgaŭ, tamen venkos. Ĉar Li estas dio de amo, ĉar Li estas kredo de ĉiuj nacioj, Lian nomon anoncas ĉiuj religioj. Li estas Dio kiu kunigos kaj pacigos la tutan homaron.

Sed militaj alarmoj prezentas kontraŭan realon : homoj ne amas Atonon, homoj Lin neglektas, kaj volas gvidi sian sovaĝan konfuze torditan vivon. Do faraono forpelis kompatindan senditon, kaj en morna etoso, mallevis kapon profunde enpensiĝinta. Levis ĝin kiam el suna ĝangalo elmergiĝis Nefertite.

— Ho, Nefertite ! — ekĝemis faraono — Mi estas la plej mizera homo en mia ŝtato ! Mi plantis en la koro de mondo arbeton de paco, kiu povus elkreski en grandan arbon, kaj ili amasigas kontraŭ mi tre pezajn nubojn kiuj minacas al nia Suno, al nia regno, al ni ĉiuj ! —

Nefertite staris en blindigaj radioj de zenitanta Aton kiel ora statuo.

— Ĉu vi ankaŭ, Nefertite, diros al mi : prenu la glavon, faraono ? !

Plenumu malmolajn devojn, defendu ŝtatlimojn, forpelu malamikojn ! —

— Faraono faras nur tion kio estas vere justa, — respondis Nefertite.

— Kaj kio estas justa ? —

— Justa estas tio kion faras Aton, lumo de tero per sia filo, Aĥnaton, faraono de Egipto. —

— Kiel vi bele esprimis miajn pensojn, Nefertite ! Staru, ne moviĝu ! Sub tia aspekto mi vin volus pentri. . . en tiu ora suno, kiel ĝia simbolo, feino el sorĉita ĝardeno, kie ĉio sopiras kaj vivas dank' al benitaj radioj. —

— Sed blovo de ventego tera ĉagrenas faraonon ! —

— Ne, Nefertite. La ventego estas nenio antaŭ potenco de Aton. Mi antaŭ nelonge neniigis en ĝermo komploton, kiu celis mortigi min kaj surtronigi unu el pastroj de Amon el Teboj. Vi scias kiel ili malamas min...—

Sed Nefertite ŝtopis siajn orelojn per manoj.

— Mi ne volas aŭdi pri tiuj teruraĵoj ! Vin kiel dian serviston ŝirmas mano de Aton ; via armilo — brilo de suno kiu faligas malamikojn. Estu trankvila en ĉiu danĝero ! —

— Ne ĉiam danĝero estas facile evitebla. Sed malgraŭ tio, spite al tio mi ĵuris sekrete antaŭ Aton ke mi neniam elverŝos sangon, nek en mia lando, nek ekstere. —

— Tial vi estos la plej bonfaranta kaj fama faraono por ĉiuj jarcentoj ! —

— Ĉu tiel estos, mi dubas. . . Eble la tribunalo de historio prijuĝos min kiel reĝon molan, virineskan ? —

— Ili nomos vin unua faraono kiu rifuzis leĝon de glavo kaj forto...—

Kiam Suno-Aton malaltigis sian flugon sur la arko descendanta super tero, faraono liberiĝis de ĉiuj ĉagrenoj kaj venkis malbonajn sentojn. Li fariĝis radianta pro ĝojo simile al Aton sur sennuba ĉielo. Plenajn de amo okulojn direktis al loko, kiu estonte estos lia la plej amata urbo, “Urbo de la suna horizonto”. Oni konstruas jam belajn palacojn, largajn stratojn, florantajn ĉielarke ĝardenojn. Faraono ĉirkaŭrajdis urbon en ora veturilo ; postsekvis lin Nefertite — diino Isis akompananta Ozirison. Kiam revenis ili al sia malnova palaco, la krepusko jam etendis flugilojn de nokto proksimiĝanta. Sklavoj alportis bruligitajn lampojn, harpisto kaj flutistoj komencis ludi ; luno elfluis sur malhele bluan firmamenton. Eksonis bela himno pri-kantanta gloron de Aton :

•“Ho, kiel ĉarma estas via vekiĝo sur ĉielo
ĉiam viva, kreo-pova Aton !
Kiam vi aperis sur la horizonto,
ĉiuj landoj droniĝas en belo ;
ĉar vi radianta, sublima kaj fora super ni,
kreitan teron karesis per multaj lumaj brakoj.
Ho, Ra, vi ĉiujn popolojn tenas en sklaveco,
en ligoj de sia amo ! ”

(aŭtentika himno, verŝajne verkita per faraono Aĥnaton).

Nokto alvenis, nokto nigra, nokto — neatendita surprizo. Nefertite kovris sin per krepusko, Nefertite fariĝis diino Nut. Jam estis multe post meznokto kiam faraono iris enlitiĝi.

En malforta lumo enfiltranta tra fenestro Aĥnaton ekvidis apud la lito figuron de sia maljuna instruisto, pastro Merira.

— Bonvenon, majstro — salutis lin faraono — dank’ al kio mi ŝuldas vian viziton ? —

— Mia filo, la noktoj estas maltrankvilaj, kvankam sinceraj. Ili malkovras multe da sekretoj. . . —

— Kian ili malkovris antaŭ vi ? —

— Sekreton de mia zorgema koro. Ne ĉio estas bona en via vivo. —

— Ne diru la enigmojn, diru malkaŝe ! —

— Estu via volo. Pleje mi volus diri senpere al koro de homo, anstataŭ diri al orelo de faraono. Interrilato inter via penso kaj ago estas disharmonia, via sinteno antaŭ ŝtataj devoj — falsa. Pro kio vi forpelas senditojn de ŝtatlimoj portantajn malbonajn novaĵojn ? Ĉu vi estas faraono sur la insulo ĉirkaŭita de ĉiuj flankoj per grandega oceano ?

— Mi estas faraono kies ŝtaton defendas Aton, unusola Dio. Mi kreis religion, unuan en la mondo, sen idoloj kaj multnombraj dioj. —

— Kiel vi ne konas vian popolon, reĝo ! — eldiris iom severe Merira — Via popolo amas diojn ; ne povas ilin anstataŭi abstrakta dieco de Aton. — Aĥnaton rigardis lin konsternita.

— Kaj vi, vi tion diras ? Vi, ĉef-episkopo de Aton ? —

— Mi, ĉef-episkopo. En mia koro kuŝas fiksita bildo de vera Dio, sed mi ne povas neglekti amason de pli malaltaj dioj, kiuj agas inter ĉielo kaj tero. Sur la suproj oni vidas Unu Vivon, sed malsupren respeguliĝas ĝi en

ĉiuj teraj akvoj kaj valoj. Tiu kiu ne atingis suprojn, vidas diverskoloran mozaikon de Granda Vivo malsupren. —

— Ho, Merira, ne faru konfuzon inter mi kaj mia kredo ! Ja mi la tutan vivon oferis al Aton, en ĉiuj landoj mi dissemis sanktan instruon. Vi scias mem ke ĉie la popoloj adoras sunon. . . ĉu mi ne povus supozi ke en ĝia nomo ili repaciĝos kaj ekamos sin reciproke kiel veraj homfratoj ? —

— Faraono ne devas esti fanatikulo. Evidente, kultoj religiaj adoras sunon, sed en la politiko la suno estingiĝas. . . Tiam mallumo regas korojn. Kiam subiras suno, oni devas pretigi glavon, tamen ne faras tion faraono Aĥnaton. Kaj ĉu mi vere aŭdis ? Anstataŭ surmeti armilon, faraono. . . meditis ! —

Aĥnaton silentis videble ĝenita.

— Ĉu tio estas vera ? Se tio estas vero, mi vokas al vi solene ! Mi vokas per voĉoj de viaj antaŭuloj, per voĉoj de faraonoj de via dinastio kaj per voĉo de via honorinda patro, Amenhotep III : leviĝu, faraono, filo kaj nepo de faraonoj ! Leviĝu kaj prenu la glavon ! Super via patrujo agonias suno, kaj pretigitaj estas katenoj por ni ĉiuj ! —

Aĥnaton respondis mallaŭte, ne levante kapon.

— Mi akceptas viajn riproĉojn, pastro. Kvankam nemeritaj kaj maljustaj, ili havas partecan veron. Mi iam longe pensis pri tio kion oni nomas Granda Vero. . . Kaj tiam aperis antaŭ miaj internaj okuloj Spirita Suno — Aton, kaj blindigis min. Ekde tiu tempo mi vivas nur kiel Lia servisto. Kaj en Lia lumo kion povus signifi sovaĝa tumulto farita per homoj ? Kiel mi, dia servisto, povus militiri por helpi garnizonojn kaj instigi militon ? Kiel mi povus samtempe konfesi amon por ĉiuj homoj, kaj dronigi glavon en ilia sango ? —

La tempo venis por Merira esti surprizita.

— Sanktaj estas viaj vortoj, kaj mi kliniĝas profunde antaŭ vi. Tamen. . . ho, mia amata lernanto, ni havas malmolan devon vivi sur la tero. . . —

— Ne finu ! Mi tro multe pri tio aŭdis ! Mi decideme rifuĝas teran devon. . . Mi vivas nur pro lumo, belo kaj bono. —

— Sanktaj estas viaj vortoj. . . Tamen konsideru. . . mi longe restadis en Hindujo — en tiu lando homoj adoras ankaŭ detruan aspekton de Dio, nomatan Ŝiva. Ofte tiu kiu detruas, savas. Ili adoras Ŝivan kun multnombraj brakoj kiuj benas, detruas kaj denove konstruas. Ŝiva — savanto kaj

renoviganto de la vivo. Ĉu vi povus esti certa ke premante unu brakon de Ŝiva, vi ne detruas alian? Ke vi ne agante, ne agas kontraŭ Ŝiva? —

— Vi tro komplikas la aferon, Merira. Kiel mi povus esti konscie agema inter implikaj brakoj de Ŝiva? Agi — ne bone, ne agi — ankaŭ ne bone. Do kion fari? —

— Saĝo nestiĝanta en via koro diktos al vi seneraran agon. Ne malhelpu per artefarita klimato de viaj ĝardenoj de feliĉo. Ĉu vi ne timas ke senĉesa sereneco de floroj. . . amo. . . suno. . . sufokos vin iutage? Foje vi ekperceptos ke mankas al vi la spiro. . . sed tiam estos tro malfrue. Konsideru tion, faraono, filo de viva Dio, kaj agu laŭ ordono de via konscienco! —

Malaperis Merira kaj faraono jam ne povis ekdormi.

Sed matene alvenis Nefertite; Nefertite kiel Aŭroro sur la trono de ekstazo. Ŝiaj brakoj lumis kaj portis sunon. Kaj denove eksonis bela himno; reĝaj filinoj alvenis ankaŭ kaj ludis sur la fluto kaj harpo. Komenciĝis bela tago de senĉesa ĝojo.

“Kiam matene vi leviĝas
portante lumon ho, Atono,
timeme forkuras la mallumo
antaŭ via fajreca vizaĝo.
Tiam en viaj landoj
pleniĝas la ĝojo,
homoj leviĝas el dorma ebrio
kaj adoras vin levante manojn.
Kvankam fiksita sur la ĉielo
neatingebla, donacas vi malavare
vian lumon; kaj ĉiu tago de nia vivo
estas stampita postsigno
de via piedo.”
(la sama himno daŭrigota)

— Sciu, Nefertite — diris Aĥnaton kiam sklavo alportis matenan manĝaĵon — mi havis hodiaŭ nokte malbonan sonĝon: nian regnon de suno invadis persekutema spirito. . . —

— Evidente ke vi donis al li reĝan forsendon? —

Aĥnaton fermis okulojn por pli bone esprimi la penson.

— Spirito tiu, vere dirite, konsistis el sango kaj ostoj, ĉar tio estis nia amata ĉefepiskopo, Merira. Li konsilis al mi. . . sed tion mi ne povas eldiri por ne ofendi nek viajn orelojn, nek tiun brilan matenon. . . —

— Mi scias kion povus diri Merira — malestime respondis Nefertite — Kion postuli de tiu infaneca maljunulo? Lia menso malvigla ne povas akcepti novajn vibraciojn, kiujn sendas al ni dia Aton; li senĉese estis fiksita en ŝimaj nocioj de antaŭa epoko, kiel vermo sub arbokrusto. Ĝuu belan tagon, Aĥnaton kaj forgesu pri afliktiĝoj de malbela. Kion vi deziras, mia karulino? — lastajn vortojn diris al malpli aĝa filineto kiu enfalis ĉambron kun la pilko.

Sed knabineto ne povis diri pro mallonga spiro. Nefertite sulkgigis brovojn kaj elkondukis ŝin sur la terason.

— Diru kio okazis? Kial vi estas tiel laca? —

— Ho, panjo — rakontis infano per trarompanta voĉo — Tio estis tiel terura! Mi ludis kun pilko en ĝardeno; subite ĝi transsaltis muron kaj mi devis serĉi ĝin ekster la muro. Tiam mi inter arbustoj ekvidis. . . teruran homon! Li estis tiel malgrasa ke la ostoj preskaŭ trabatadis lian haŭton. Li penetreme min rigardis kaj diris: “Reĝa filineto, vi ne estos feliĉa! Malicaj ventoj forportis vian reĝan mantelon pli fore ol nun la pilkon. Iru al via patro kaj diru, ke tiel parolis forpelita sendito el Jerozolimo” — poste li diris ankoraŭ iajn strangajn vortojn kaj pene leviĝinte, malaperis. —

— Kompatinda infano! — konsolis ŝin Nefertite kareseme — Ne timu kaj ludu daŭre en la ĝardeno! Ripetu nenion al patro. Tiu homo estis freneza. Nenio povus nin minaci sub radiantanta okulo de Aton. —

Tamen revenante sentis Nefertite ke postsekvis ŝin strio de ĉagreno kiu trenante sin tra egipta tero, tuŝis ŝin ankaŭ, ĝian reĝinon. Kiel facile rompebla estas homa koro! Kiel malfacile estas teni oran pilkon de feliĉo! Ŝi iris tra aleo ombrigita per grandaj arboj tiel singarde kvazaŭ ŝi timis perdi oran pilkon. Tiel ŝi alvenis al negranda lageto surkreskita de blankaj lotusoj. Tio estis ĉarma loko, benita de Aton. Delikataj gutoj de roso brilis sur larĝaj folioj. Aton ĵetadis rekte siajn orajn sagojn. Estis silenta, sankta horo de meztago.

“Ho, Aton, Aton! — Nefertite levis manojn al ĉielo — Benu nian feliĉegon, permesu ke nenio malklarigos nian beatecon en via regno de suno!”.

Abonu kaj abonigu la revuon **Oomoto** ĉe niaj reprezentantoj :

Laŭlanda Abonkotizo de **Oomoto** por 1 jaro

Lando kaj kotizo :	pagu al :
Argentino egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld.)	S-ro Mariano Calvo, El Rastreador, 679 Barrio Liniers, Buenos Aires 8a
Aŭstralio 11 ŝil.	S-ro F. R. Banham, 31st Andrew's Avenue, Heidelberg W. 22, Victoria
Brazilo egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld.)	Prof. Benedicto Silva, Rua Duque de Caxias, 96 Monte Aprazivel SP
Britujo 9 ŝil.	D-ro A. Mildwurf, 71 Compayne-Gardens, London N. W. 6
Bulgarujo egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld.)	S-ro Atanas Nikolov, Str. IV Asen, II 28, Sofia
Ĉeĥoslovakio egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld.)	S-ino Cířková Jana, Praha 9, u Svobodarny 12
Danlando 9 d.kr.	S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21. 13-Kopenhago BRH
Finnlando 4.50 f. mk.	S-ro Joel Vilkki, Somero
Francujo 6.30 F.	S-ino Renée Volpeliere, Ul. 2018, 10 rue de la Servie, Nimes (Gard) — Poŝtĉekkonto : Montpellier 1070-06
Germanujo 5 g. mk.	S-ro F. Moravec, 239, Flensburg-Murwik, Fördestr. 15. Poŝtĉekkonto : Homburg 683 19
(DDR) egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld)	S-ro Albert Klemm, Schwarzburger Strasse 5, Bad Blankenburg (Thur, Wald)
Grekujo 38 dr.	S-ro K. Zahariadis, Parodos Gabriel, Vasiliadis 4, Kirokrini, Thessaloniki
Hindujo 6 rp.	S-ro R. B. Joshi, H. No 297-A, Gangapuri, Wai, Distr. Satara, Maharashtra State
Hungarujo egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld.)	D-ro Balla Ignác, Nagy-Lajos, k. u. 203, Budapest 14
Italujo 800 liroj	S-ro Giovanni Della Savia, Via L. Moretti 11, Udine
Izraelo egalvaloro de 18 steloj (4.50 n.gld)	S-ro Ben-Alter Jehiel, Ta Doar 379, Petah-Tikva
Jugoslavio 760 din.	S-ro Jedjini Martin, Djure Djakovica 11/I, Subotica
Kanado 1.40 dol.	S-ino Vilma Eichholz, Esperanto-domo, P. O. Box 344, Oakville, Ontario
Meksikio 16 pesoj	S-ro José Serrano L., Central de Talabarteros 72, Col. E. Carranza, Meksiko
Nov-Zelando 9 ŝil.	S-ro W. Hudson King, 23 Burch Street, Mount Albert, Auckland, S. W. 2
Portugalujo 38 esk.	S-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4, dto, Lisbõa
Svedujo 6.50 sv. kr.	S-ro A. H. Tähtinen, Timkatan 3, IV, G'teborg N
Usono 1.40 dol.	S-ino Catherine L. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, 94010, Calif.

En landoj, kies nomo ne troviĝas en la supra listo, oni sendu abonkotizon (egalan al 4.50 n.gld.) al : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam-2, Nederlando, aŭ rekte al : Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Utafesta Poemaro

Bind. 105 p. \$ 2 aŭ 7,20 ned. gld.

Ĉi tiu poezia libro ĵus eldoniĝis je la 1-a datreveno de l' Oomoto-Internacia Festivalo kun 29 poemoj elektitaj el ĉiuj kontribuaĵoj de la Utafesto. La libro konsistas el du partoj: Parto I entenas la poemojn premiitajn, kaj elektitajn por "Laŭdo", kun la portretoj de la laŭreatoj, kaj Parto II entenas 15 poemojn, poste elektitajn por pliriĉigi la enhavon de ĉi tiu memorlibro. — Oomoto

Enciklopedieto Japanana

kun 400 terminoj

Bind. 217 p. \$ 5 aŭ 18 ned. gld.

"Feliĉe, japanaj verkoj en Esperanto plimultiĝas, sed foje tiuj fenestroj al la japana mondo restas iom neklaraj pro fremdeco de la bazaj konceptoj kaj terminoj. Tial ankaŭ por la libro-amantoj la Enciklopedieto fariĝos ŝatata apogilo dum la vojaĝo tra japana literaturo". — Victor Sadler.

Okakura :

La Libro de Teo

en trad. de T. Nakamura

Bind. 142 p. \$ 2.50 aŭ 9 ned. gld.

"Al mi ĉi tiu verko montriĝis samtempe kiel fajna, ĉarma elmontriĝo de Filozofio, Moralo kaj Etiko, ĉio aranĝita kun plej alta konscio de estetikismo, kio faras la libron plej perfekta artverko en la vera senco de tiu ĉi vorto. Kaj oni ne eraras, se oni diras, ke ĝi estas esence kaj super ĉio poezia verko!"

— Benedicto Silva.

Mendu ĉe : **Universala Esperanto-Asocio**

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando